# *MOS dekretas la finon de la tutmonda sankrizo pro Kovim-19*



?enevo, maj 5 (RHK) La ?enerala direktoro de la Monda Organizo pri Sano (MOS), Tedros Adhanom Ghebreyesus, dekretis ?i-vendredon la finon de la tutmonda sankrizo pro Kovim-19.

La? deklaroj de Ghebreyesus, publikigitaj en la Tviter-konto de la organizo, dum la pasinta jaro, la Kriz-Komitato kaj la MOS analizis la datumojn kaj "konsideris kiam estus la ?usta tempo por malaltigi la alarmnivelon."

Tiel, ?i-?a?de la Kriz-Komitato rekomendis, ke li deklaru la finon de la publika sano krizo de internacia graveco, kaj Ghebreyesus decidis "akcepti tiun konsilon".

Fonto:RT

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/321790-mos-dekretas-la-finon-de-la-tutmonda-sankrizo-pro-kovim-19

**Radio Habana Cuba**